29-a IF - Internacia Festivalo

27 dec 2012 - 3 jan 2013 (kun plilongiga ebleco ĝis 4 jan 2013)

urbocentre en Dortmund (Germanio)

atentu niajn rabato-kuponojn!

aliĝu jam nun!

Dortmund, la "enira pordo" al la konata Rur-regiono, bonvenigas vin en 2012! Ni IF-umas meze en la urba centro (400 m al butikuma strato, 500 m al ĉefa stacidomo), la klerigejo ofertas varian elekton de ĉambroj (ĉiuj kun duŝo kaj necesejo), salonojn kaj etosoplenan trinkejon (iama profesia restoracio, nia dumsemajna Knajpo, vd. apudan foton) ...

INTERNACIA FESTIVALO

www.internacia-festivalo.de

... jarfine al IF

Tuttaga ekskurso dim, 30 dec 2012

> Tour de Ruhr < tra la Rur-regiono*

(1)

(2)

(3)

(4)

* La nomo venas de la rivero Ruhr, kiu en la suda parto trafluas la regionon. Kun pli ol 4 mil km² kaj 5 milionoj da loĝantoj ĝi estas la plej granda aglomera zono en Germanio. La grandaj urboj (Dortmund, Bochum, Essen, Oberhausen), konataj pro la iamaj industriaj centroj, intertempe pli kaj pli 'kunkreskis', tiel ke ofte ne plu estas rekonebla la urba limo. Sekve de strukturaj ŝanĝoj, multaj urboj nun sukcese transformiĝas al modernaj servaj kaj libertempaj metropoloj, la iamaj industriaj gigantoj (minejoj) fariĝis muzeoj aŭ gastigas modernajn magazenojn. Antaŭ du jaroj la tuta regiono, kiel "Ruhr 2010", fariĝis Eŭropa kultura ĉefurbo (1). Dum nia tuttaga ekskurso ni vizitos kelkajn tipajn lokojn: planetarion en Bochum (2), iaman gas-rezervujon kaj nuntempan ekspoziciejon en Oberhausen (3), same minejan muzeon en Essen (4). Dortmund, "enira pordo" al la regiono, famis pro grandaj bierfarejoj, nuntempe unu el ĝi (U) fariĝis muzeo (5).

Biletoj (inkl. de restoracia menuo):
infanoj (kun infana menuo) 40 €
aliaj (kun kompleta menuo) 50 €

(5)